

# LA LAGUNA

# XXIX HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

# XXIX

# HISPANA KONGRESO

DE

# ESPERANTO

5-10 JULIO 1969

LA LAGUNA (TENERIFE)

# LA ESPERO

En la mondon venis nova sento
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

L. ZAMENHOF


*Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj*
*Velkantajn foliojn deŝiras,*
*Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,*
*Ni forton pli freŝan akiras.*

*Ne mortos jam nia bravega anaro,*
*Ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,*
*Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,*
*Al cel' unu fojon signita!*

*Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante*
*Ni iru la vojon celitan!*
*Eĉ guto malgranda, konstante frapante*
*Traboras la monton granitan.*

*L' espero, l' obstino kaj la pacienco —*
*Jen estas la signoj, per kies potenco*
*Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,*
*Atingos la celon en gloro.*

L. ZAMENHOF
Fragmento el *La Vojo*





15 - 12 - 1859 14 - 4 - 1917

SALUTO

KAJ

INVITO



Estas por mi granda ĝojo saluti, per tiuj ĉi nemultaj linioj en la Libro de nia 29ª Hispana Kongreso, tiujn personojn, kiujn jam aliĝis kaj esperas veni al tiuj Insuloj iam prave nomitaj *Afortunadas,* t. e. 'feliĉ(ig)aj' aŭ 'favorataj de la sorto'; almenaŭ estu nun feliĉaj tiuj homoj, kiuj venos partopreni nian Kongreson.

Mi jam diris en aliaj okazo kaj loko, ke tra tiuj hispanaj provincoj Hispanujo malfermiĝas al la mondo, ĉar en iliaj havenoj haltas la plej granda nombro da ŝipoj kun fremda flago, kiuj vizitas nian Patrujon, kaj al iliaj flughavenoj venas senĉese aviadiloj de ĉiu mondparto.

Nun, por unuiĝi en intima brakumo, ni, la tuta hispana esperantista familio, iros tien, kaj, kun ĝi, ĝia maljuna Prezidanto, kiu, post la Universala Kongreso okazinta en Madrido, ne havis alian iluzion ol okazigi en Kanariaj Insuloj la Nacian Kongreson.

Esperante, ke mi tie povos persone ĉirkaŭbraki la kongresantajn esperantistojn, mi, el tiuj ĉi paĝoj, sendas anticipe al ili, kaj ankaŭ al ĉiuj, la plej koran kaj fratan saluton.

MIGUEL SANCHO IZQUIERDO
**Prezidanto de H. E. F.**



AL

ĈIUJ,

BONVENON!

Kiel Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, mi tre ĝojas, ke Hispana Esperanto-Federacio decidis aranĝi la 29an Hispanan Kongreson de Esperanto en La Laguna. Estante universitata sidejo kaj tial konstanta kongresurbo, La Laguna aperis al niaj landaj esperantistaj aŭtoritatoj kiel plej taŭga loko por nia Nacia Kongreso.

Al tio aldoniĝas la fakto, ke la Universitato de La Laguna estas nun la sola en Hispanujo, kiu donas al Esperanto oficialan agnoskon, ĉar ekde 1963 la Lingvo Internacia estas ordinara studobjekto en ĝia Instituto pri Lingvoj. La Kongreso do estas samtempe omaĝo al tiu progresema decido.

Mi esperas, ke la landaj kaj eksterlandaj kongresanoj plenumos bonan laboron dum la Kongreso de La Laguna kaj ke en ĝia kadro ili akiros kaj firmigos interesajn kontaktojn. Sed samtempe mi esperas, ke ĉiuj povos kolekti tre agrablajn impresojn kaj travivaĵojn, same kulturajn kiel pejzaĝajn, kiujn ili povos kunporti al siaj respektivaj hejmoj kiel belan memoraĵon.

JUAN RÉGULO PÉREZ
Prezidanto de la LKK

## COMITÉ DE HONOR

Excmo. Sr. Capitán General de Canarias
*Don José Héctor Vázquez*

Excmo. Sr. Gobernador Civil de Santa Cruz de Tenerife
*Don Mariano Nicolás García*

Excmo. Sr. Presidente de la Audiencia Provincial
*Don Ildefonso La-Roche Lecuona*

Excmo. y Revmo. Sr. Obispo de Tenerife
*Don Luis Franco Cascón*

Magco. y Excmo. Sr. Rector de la Universidad de La Laguna
*Don Jesús Hernández Perera*

Iltmo. Sr. Presidente de la Excma. Mancomunidad Provincial y del Excmo. Cabildo Insular de Tenerife
*Don José Miguel Galván Bello*

Iltmo. Sr. Alcalde del Excmo. Ayuntamiento de La Laguna
*Don Francisco Marcos Hernández*

Iltmo. Sr. Alcalde del Excmo. Ayuntamiento de Santa Cruz de Tenerife
*Don Pedro Doblado Claverie*

Iltmo. Sr. Alcalde del Excmo. Ayuntamiento del Puerto de la Cruz
*Don Felipe Machado del Hoyo*

Iltmo. Sr. Delegado Provincial de Hacienda
*Don Vicente Canelles Verdiá*

Iltmo. Sr. Delegado Provincial de Información y Turismo
*Don Manuel Delgado Aranda*

Iltmo. Sr. Delegado Provincial de Sindicatos
*Don Luis Cuesta Giménez*

# COMITÉ LOCAL DEL CONGRESO (LKK)

Presidente:
Don Juan Régulo Pérez

Secretario:
Don Antonio Ferrer Hervás

Terorero:
Don Ángel Pombrol Hernández

Asuntos generales:
Don Nicolás Pérez Álvarez

Alojamiento:
Don Ramón Rodríguez Peña

Vocales:
Don Antonio Benítez Hernández

Doña Ana María Ferrer Hervás

Don Antonio Ferrer Soler

Doña Francisca González Ramos

Don José Palmero Pérez

---

XXIX Hispana Kongreso de Esperanto

Akceptejo kaj Kongresejo: Universidad

5 al 10 de julio 1969

## DIRECTIVA DE H. E. F.

Presidente:
Excmo. Sr. Prof. Dr. D. Miguel Sancho Izquierdo

Vicepresidente:
Don Víctor Ortiz Gratal

Secretaria:
Doña Inés Gastón Burillo

Vicesecretario:
Don José Andrés Aldana

Tesorera:
Doña María Pilar Gómez Hernández

Vocales:
Don Luis de Otaola Faón
Don Juan Devís Calpe
Don Giordano Moya Escayola
Don Ángel Díez García
Don Santos P. Arranz

---

## SECCIONES DE H. E. F.

### SECCIÓN JUVENIL (H. E. J. S.)

Presidente: Don Salvador Aragay Galvany

### SECCIÓN DE ESPERANTISTAS CIEGOS (H. E. A.)

Presidente: Don Ángel Figuerola Auque

### SECCIÓN DE FERROVIARIOS ESPERANTISTAS (H. E. F. A.)

Presidente: Don Ramón Giménez Felíu


### SECCIÓN DE TURISMO

Presidente: Doña Inés Gastón Burillo


# PRELEGANTOJ DE LA XXIX

Prof. D-ro Miguel Sancho Izquierdo
Prezidanto de H. E. F.
Hispane
Bildo sur paĝo 5

Prof. D-ro Juan Régulo Pérez
Prezidanto de la LKK
Esperante
Bildo sur paĝo 6



S-ro Giordano Moya Escayola
Estrarano de H. E. F.
Esperante



D-ro Rafael Herrero Arroyo
Honora Prezidanto de H. E. F.
Hispane

# DIRECCIONES ÚTILES

Presidente de H. E. F.:

Excmo. Sr. Prof. Dr. D. Miguel Sancho Izquierdo
Torrenueva, 30, 1° — Zaragoza

Secretaria de H. E. F.:

Doña Inés Gastón Burillo
Pº Marina Moreno, 35, 4°, Dcha. — Zaragoza

Tesorera de H. E. F.:

Doña María Pilar Gómez Hernández
Bolonia, 14, 1° — Zaragoza

«Boletín de la Federación Española de Esperanto»

Redacción y Administración:
Pº Marina Moreno, 35, 4°, Dcha. — Zaragoza

ESTADÍSTICA:

Don Salvador Aragay Galvany
Bassegoda, 40, 3 . 1° — Barcelona 14

SERVICIO DE LIBROS:

Secretaría de H. E. F.
Pº Marina Moreno, 35, 4°, Dcha. — Zaragoza

CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA:

Don Ramón Molera Pedrals
Santa Joaquina de Vedruna, 13 — Moyá (Barcelona)

EDITORIAL ESPERANTISTA («STAFETO»-SERIOJ):

J. Régulo — Eldonisto
Apartado 25
La Laguna — Tenerife (Canarias)

# NACIAJ ESPERANTO-KONGRESOJ

| | | |
|---|---|---|
| 1 | 1920 | BARCELONA |
| 2 | 1921 | ZARAGOZA |
| 3 | 1923 | VALENCIA |
| 4 | 1924 | BILBAO |
| 5 | 1925 | CÓRDOBA |
| 6 | 1926 | MADRID |
| 7 | 1928 | SEVILLA |
| 8 | 1929 | OVIEDO |
| 9 | 1930 | MADRID |
| 10 | 1933 | SANTANDER |
| 11 | 1936 | BARCELONA |
| 12 | 1951 | TARRASA |
| 13 | 1952 | VALENCIA |
| 14 | 1953 | BILBAO |
| 15 | 1954 | ZARAGOZA |
| 16 | 1955 | GIJÓN |
| 17 | 1956 | BARCELONA |
| 18 | 1957 | MADRID |
| 19 | 1958 | CASTELLÓN DE LA PLANA |
| 20 | 1959 | MÁLAGA |
| 21 | 1960 | PONTEVEDRA |
| 22 | 1961 | PALMA DE MALLORCA |
| 23 | 1962 | VALLADOLID |
| 24 | 1963 | BARCELONA |
| 25 | 1964 | VALENCIA |
| 26 | 1965 | PALENCIA |
| 27 | 1966 | BILBAO |
| 28 | 1967 | ZARAGOZA |
| 29 | 1969 | LA LAGUNA |

# INTERNACIAJ ESPERANTO-KONGRESOJ

| | | |
|---|---|---|
| 1 | 1905 | Boulogne-sur-Mer. Francujo |
| 2 | 1906 | Genève. Svisujo |
| 3 | 1907 | Cambridge. Britujo |
| 4 | 1908 | Dresden. Germanujo |
| 5 | 1909 | Barcelona. Hispanujo |
| 6 | 1910 | Washington. Usono |
| 7 | 1911 | Antwerpen. Belgujo |
| 8 | 1912 | Kraków. Polujo |
| 9 | 1913 | Bern. Svisujo |
| 10 | 1914 | Paris. Francujo. Ne okazis pro la militdeklaro |
| 11 | 1915 | San Francisco. Usono |
| 12 | 1920 | Den Haag. Nederlando |
| 13 | 1921 | Praha. Ĉeĥoslovakujo |
| 14 | 1922 | Helsinki. Finnlando |
| 15 | 1923 | Nürnberg. Germanujo |
| 16 | 1924 | Wien. Aŭstrujo |
| 17 | 1925 | Genève. Svisujo |
| 18 | 1926 | Edinburgh. Skotlando |
| 19 | 1927 | Danzig. |
| 20 | 1928 | Antwerpen. Belgujo |
| 21 | 1929 | Budapest. Hugarujo |
| 22 | 1930 | Oxford. Britujo |
| 23 | 1931 | Kraków. Polujo |
| 24 | 1932 | Paris. Francujo |
| 25 | 1933 | Köln. Germanujo |
| 26 | 1934 | Stockholm. Svedujo |
| 27 | 1935 | Roma. Italujo |
| 28 | 1936 | Wien. Aŭstrujo |
| 29 | 1937 | Warszawa. Polujo |
| 30 | 1938 | London. Britujo |
| 31 | 1939 | Bern. Svislando |
| 32 | 1947 | Bern. Svislando |
| 33 | 1948 | Malmö. Svedujo |
| 34 | 1949 | Bournemouth. Britujo |
| 35 | 1950 | Paris. Francujo |
| 36 | 1951 | München. Germanujo |
| 37 | 1952 | Oslo. Norvegujo |
| 38 | 1953 | Zagreb. Jugoslavujo |
| 39 | 1954 | Haarlem. Nederlando |
| 40 | 1955 | Bologna. Italujo |
| 41 | 1956 | København. Danujo |
| 42 | 1957 | Marseille. Francujo |
| 43 | 1958 | Mainz. Germanujo |
| 44 | 1959 | Warszawa. Polujo |
| 45 | 1960 | Bruselo. Belgujo |
| 46 | 1961 | Harrogate. Britujo |
| 47 | 1962 | København. Danujo |
| 48 | 1963 | Sofia. Bulgarujo |
| 49 | 1964 | Den Haag. Nederlando |
| 50 | 1965 | Tokio. Japanujo |
| 51 | 1966 | Budapest. Hungarujo |
| 52 | 1967 | (Tel-Aviv) - Rotterdam. Nederlando |
| 53 | 1968 | Madrid. Hispanujo |
| 54 | 1969 | Helsinki. Finnlando |



Draceno aŭ drakarbo, estingiĝanta endemia liliaco, relikvo el la terciara epoko. Lastaj esploroj trovis, ke kelkaj tenerifaj ekzempleroj aĝas pli ol 3.000 jarojn. Surbilde, belega ekzemplero de La Laguna



Nobela palaco de La Laguna, konstruita en la 18ª jc.

XXIX HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

ORGANIZITA DE H. E. F. — LA LAGUNA (TENERIFE) 5-10 JULIO 1969


# ĜENERALA PROGRAMO

| | | |
|---|---|---|
| 5 julio | 9.00 | Giĉetoj malfermitaj. |
| | 12.30 | Solena Inaŭguro de la Kongreso, kiun finos prelego hispanlingva de Prof. D-ro Miguel Sanĉho Izquierdo. |
| | 16.00 | Laborkunsido de la Estraro de H. E. F. kun Delegitoj de Grupoj. |
| | 18.00 | Katolika Meso kun prediko en esperanto. |
| | 19.30 | Inaŭguro de Ekspozicio de Esperanta Bibliografio en la Ekspozicia Salono de la Ŝparkaso de Tenerifo, La Laguna, str. Obispo Rey Redondo, n° 55. Dum tiu inaŭguro okazos omaĝo de H. E. F. al eldonisto J. Régulo. |
| 6 julio | 11-14 | Regiona Folklora Pilgrimo honore al Sankta Benedikto (Ekstertenerifaj kongresanoj havas rezervitajn sidlokojn). |
| | | Libera posttagmezo. |
| 7 julio | 9.00 | Laborkunsido de la Estraro de H. E. F. kun Delegitoj de Grupoj. |
| | | Fakaj kunvenoj kaj laborkunsidoj. |
| | 12.30 | Prelego en esperanto de Prof. D-ro Juan Régulo Pérez. |
| | 16.00 | Akcepto en la urbodomo de La Laguna kaj ekskurso al vidinda najbaraĵo kun regalo de la urbestraro. Dum la akcepto okazos omaĝo de la esperantistoj de Tenerifo al Prof. D-ro J. Maynar kaj al Prof. D-ro E. Serra. |
| 8 julio | 9-22 | Tuttaga ekskurso al la piedo de la monto Tejde kun regalo je tagmezo en Parador Nacional, per kiu Cabildo Insular de Tenerife honoras la Kongreson. Revene, vizito al la turisma urbo Puerto de la Cruz kun regalo de ĉi ties magistrato. |
| 9 julio | 9.00 | Libervola vizito al la cigar- kaj cigaredfabrikejo «La Luĉha» en Santa Cruz. |
| | 10.00 | Libervola vizito al Petrolrafinejo de CEPSA en Santa Cruz. |
| | 13.00 | Akcepto en la urbodomo de Santa Cruz de Tenerife. |
| | 16.00 | Ĝenerala kunveno de H. E. F. |
| | 19.30 | Prelego en esperanto de S-ro Giordano Moya Escayola. |
| | 22.00 | Oficiala Bankedo en hotelo «Nautilus» de Bajamar (La Laguna). |
| 10 julio | 9.00 | Ekzamenoj.<br>Fakaj laborkunsidoj. |
| | 11.00 | Prelego hispanlingva de D-ro Rafael Herrero Arroyo. |
| | 12.30 | Solena Fermo de la Kongreso. |

Kongresejo kaj Akceptejo: Universitato



Tahinasto ruĝa aŭ tejda ekio, boragaco kreskanta je 2.000-2.3000-metra alto nur piede de monto Tejdo, fone videbla



Elaera panoramo de la haveno de Santa Cruz, ĉefurbo de Tenerifo

# ESPERANTO EN KANARIOJ

Unuaj esperantistoj, pri kiuj ni havas fidindajn sciigojn, estis, ĉirkaŭ 1905, Ángel Rodríguez Álvarez, profesoro en la Instruista Seminario de Las Palmas kaj aŭtoro de la ĝis antaŭ ne longe fama popollerneja libro *Rayas,* kaj Luis Alvarado, direktoro de la sama Seminario. Ĉirkaŭ 1908, telegrafisto José del Castillo y Pez, de Telde (Gran Canaria), konigis la lingvon al komercisto Felipe Suárez Falcón, kiu poste rolis tre aktive en la esperantista vivo de Las Palmas. En 1915 estis fondita *Centro Esperantista de Las Palmas*, dank' al kiu okazis multaj kursoj ĝis 1936, kaj eĉ unu strato de tiu urbo ricevis la nomon «Esperanto» (dum nia civilmilito anstataŭigita je nomo de generalo). Inter la kursogvidantoj estas menciindaj, krom la nomita S-ro Suárez, ŝtata oficisto Antonio Llinás Bellvehí kaj makleristo José Báez Báez.

Tamen la unua esperantista societo de Kanarioj estis fondita en Santa Cruz de Tenerife, en 1907; ĝia prezidanto estis Juan Cambreleng Uque, sed ĝi ne lasis postsignojn. Dank' al propagando farita en 1910-1912 de makleristo Heriberto Díaz Santana, en 1913 estis laŭleĝe aprobita la starigo de *Grupo Esperantista de Tenerife*, kiun prezidis S-ro Díaz. Sed same kiel la societo de 1907, ĉi tiu de 1913 ne estigis pozitivajn rezultaĵojn.

En 1908 fondiĝis en La Laguna rondo por propagandi kaj instrui Esperanton, prezidata de portugalo Sebastião dos Santos Ferreira; sed malgraŭ disdono de flugfolioj, alvoko per afiŝoj kaj organizo de kelkaj dancofestoj en sia sidejo, strato Álamos, ankaŭ ĝi ne sukcesis enradikigi la aferon.

En La Palma unue propagandis Esperanton kapitano Antonio Pérez Linares, en lernejo, kiun li posedis en strato Zarza (nun Fernández Ferraz); kelkaj liaj lernantoj aĉetis lernolibrojn, sed kiam en 1910 S-ro Pérez forlasis la insulon, neniu plu okupiĝis pri Esperanto ĝis 1929, kiam venis al Santa Cruz de La Palma instruisto Antonio de Juan Torres, dank' al kies agado estis fondita en 1931 Esperanto-grupo sub la nomo *Espero,* kun sidejo en strato San Telmo. En 1932 aperis, sed nur surpapere, *Kanaria Esperantista Federacio,* ankaŭ en Santa Cruz de La Palma, kies prezidanto estis masonisto Víctor Ferraz Armas.



Esperanto-grupo "Espero", Santa Cruz de La Palma, 1932



Unua libera Esperanto-kurso en la Universitato de La Laguna, 1947

Studento Juan Régulo Pérez, inicita de S-ro de Juan en 1932, gvidis poste, en 1933 kaj 1934, kursojn en Tazacorte (La Palma), kie li ekdeĵoris kiel popollerneja instruisto.

Post la granda silento, kiun diktis unue la hispana interfrata kaj poste la dua tutmonda milito (1936-1945), unuaj publikaj poresperantaj elpaŝoj okazis en La Laguna (Tenerifo). Juan Régulo Pérez, ĵus enoficigita kiel helpprofesoro en la Filozofia kaj Beletra Fakultato de la ŝtata Universitato de La Laguna, akiris permeson de sia dekano, profesoro Elías Serra Ràfols, gvidi liberan kurson en la Fakultato, kiu normale okazis ĉiulernojare ekde komenco de 1947 ĝis 1949, kiam nova rektoro nuligis la dekanan permeson. Sed ĉar intereso estis vekita, S-ro Régulo daŭre gvidis kursojn, unue en kadro de kultura societo kaj poste de ŝtataj Politeĥnika Lernejo kaj Liceo de La Laguna kaj Komerca Lernejo de Santa Cruz, ĝis 1955. Ĉar tiuj kursoj estis bone vizititaj, Direktoro de Eksterfakultataj Kursoj de la Universitato, profesoro José Ortego Costales, je peto de S-ro Régulo konsentis organizi kursojn de Esperanto, sonde aŭ eksperimente, en eksteroficiala kadro, ekde fino de 1955. La nombro da lernantoj kaj la intereso montriĝis tiel kontentigaj, ke je propono de pioniro profesoro Jesús Maynar Duplá, kun apogo de profesoro Elías Serra Ràfols, ambaŭ tiam dekanoj, kaj de rektoro profesoro Antonio González, instruado de Esperanto estis unuanime oficiale starigita de la universitata estraro, en la Instituto pri Lingvoj de la Universitato de La Laguna, la 7an de decembro 1963, kie ĝi daŭras ĝis nun, rangante, laŭ la nombro da lernantoj, preskaŭ ĉiam trialoke inter la kvin lingvoj instrutaj en tiu Instituto. D-ro Régulo estis nomita ĝia profesoro.

Por koherigi la esperantistaron, la 16an de februaro 1957 okazis fondkunveno de *Esperantista Societo de Tenerifo* (mallonge: ESTO), kiu nun havas iom pli ol 100 kotizantajn membrojn kaj kiun sinsekve prezidis venezuela konsulo José Roberto Vivas, instruisto Ángel Pombrol Hernández, profesoro Juan Régulo Pérez, meĥanikisto Nicolás Pérez Álvarez, instruisto Ramón Rodríguez Peña kaj notario Manuel Manteca López. La tiel estigita esperantista atmosfero de La Laguna estis bazo por nomigi, en januaro 1961, straton de la urbo «Dr. Zamenhof». La Societo propagandis la aferon per ekskursoj kun prelegoj al multaj komunumoj de Tenerifo, samtempe aktive rolante en la urba medio, ekzemple per kunlaboro al la tradiciaj surstrataj flortapiŝoj de la *Corpus Christi*-festo.



**Esperantistoj de Tenerifo post la inaŭguro de la strato "Dr. Zamenhof" en La Laguna, 1961**



**Aŭtoritatoj, profesoroj kaj lernantoj ĉeestintaj la inaŭguran lecionon de la unua oficiala universitata Esperanto-kurso en La Laguna, 1963**

Unua gazeto kun Esperanto-teksto presita en Kanarioj estis «Nia Idealo», laborista, kiun ĉefredaktis José Camino Oliva en Las Palmas kaj kies Esperanto-redaktoro estis Juan Régulo. Poste, en 1958 kaj 1959, Esperantista Societo de Tenerifo eldonis du presitajn ekzemplerojn de sia «Rondiranto». De «Nia Idealo», trimonata, aperis nur tri ekzempleroj, la lasta en junio 1936.

Sed la ĉefa famigilo, kiun donis al la tutmonda Movado la kanaria esperantismo, aldone al la starigo de oficiala instruado de Esperanto en la Universitato de La Laguna, estas la starto de J. Régulo en 1952 kiel eldonisto en la Internacia Lingvo. Liaj eldonoj baldaŭ disfamiĝis, dank' al sia bela prezento, elstara lingvaĵo kaj fundamenta zorgo pri la disflorado de nia originala literaturo. Kelkaj libroj aperintaj en La Laguna, originale verkitaj en Esperanto, estis tradukitaj al etnaj lingvoj; unu el ili, *La vivo de la plantoj* de D-ro Paul Neergaard, jam al ok. Kaj ĝuste en 1969 la libroj de J. Régulo, familiare konataj sub la marko STAFETO, atingis la jubilean numeron 75, kies titolojn registras la kvara katalogo presita de tiu eldonisto.

Izolaj esperantistoj troviĝis kaj daŭre troviĝas en la Insularo. En Icod (Tenerife), notario Manuel Manteca López gvidis kursojn en kadro de loka kultura societo. En Las Palmas, ĉirkaŭ 1957-1960, funkciis Universitata Esperanto-Rondo, kies animo estis Oscar Yanes Miranda. En La Palma izoluloj nun troviĝas triloke. Iam kaj tiam sin anoncis aliaj en El Hierro, Lanzarote aŭ Fuerteventura. Sed neniam ie, ekster La Laguna, estiĝis daŭremaj kernoj dum la lastaj jaroj.

Ekde sia fondiĝo, UEA ĉiam registris Delegitojn en la Insularo.

La katedron de Esperanto en La Laguna honoris diversaj konataj esperantistoj per prelegoj al ĝiaj gelernantoj. Inter ili, inĝeniero Jan R. G. Isbrucker, prezidanto de la Akademio de Esperanto, nederlandano; profesoro Gaston Waringhien, prezidanto de la Akademio de Esperanto, franco; instruisto Ernfrid Malmgren, Honora Prezidanto de UEA, svedo; D-ro Tadros Megalli, ĵurnalisto, egipto, ktp.

Espereble, la 29ª Hispana Kongreso de Esperanto, ekde nun en la historio de la landa, sed ĉefe de la kanaria Esperanto-movado, montriĝos firma ŝtupo al novaj atingoj.—J. Régulo.

# ESTIĜO KAJ DESTINO DE LA LAGUNA

Tradicie oni atribuas al la konkerinto de Tenerifo nobelo Alonso Fernández de Lugo la fondon de La Laguna tuj post la fino de la konkero. Tre probable li estis jam pripensinta sidlokon, kiam printempe 1496 li kunportis al la kastilia kortego indiĝenajn etreĝojn, kiel venkopredon, por ilin prezenti al la Katolikaj Gereĝoj. Sed fakte ŝajnas, ke ne ekzistis antaŭplano nek interkonsento —por kio cetere eĉ ne estis sufiĉe da tempo— inter la konkerinto kaj ĉi ties kunhelpantoj, kaj tiel la konkerkapitanoj kaj iliaj kunlaborantoj propramove permesis, sen atendo je reveno de nobelo Alonso, starigi, tute laŭhazarde, la unuajn pajlokabanojn kaj areon por preĝejo, konsistigintajn la kernon de la estonta urbo. Tiucele ili elektis altaĵeton apud laguno, kiun formis la vintraj pluvoj sur la *Aguere*-plataĵo. Tiu ĉi monteto, hodiaŭ sidejo de paroĥo dediĉita al *la Concepción,* protektis la loĝejojn kontraŭ la akvoj, kiuj neniam havis precizajn atingolimojn, kaj samtempe ĝi ne malhelpis fosadon de putoj, kiam la akvoj malaperis. Sed la ĥaoso en la ordigo de la loĝejoj kaj en la socia konsisto de la loĝantoj ŝajne estis tiel plena, ke ne estas mirinde, ke ĝi ne trovis aprobon de nobelo Alonso, kiam li revenis en 1497.

Tiel do la unua spontana estiĝo, kontraŭ alia pli-malpli planita kiu sekvis, apud decido krei paŝtejon ĉirkaŭ la tuta urbo, kie ne nur estis malpermesite konstrui domojn, sed ankaŭ kultivi aŭ eĉ ekspluati kampojn alimaniere ol kiel paŝtejon por privilegiitaj brutaroj —konsistigitaj ĉefe de transportbestoj—; ĉiuj ĉi tiuj faktoroj kondiĉis la materialan elvolviĝon de la urbo dum jarcentoj.

Ĉe la politika kaj morala flankoj, la fakto, ke La Laguna havis ekskluzivan urborajton, kun teoria ekskludo de kiu ajn alia loko de la insulo, donis al La Laguna distingan superecon kontraŭ ĉiuj, same ĉu ili situis meze de agrokulturaj zonoj pli riĉaj, kiel *La Orotava*, aŭ ĉu ili estis centroj de spontana trafiko, kiel la haveno *Santa Cruz*.

La plano de nobelo Alonso starigi regulan urbon kun, se ne rektaj, almenaŭ ja klare orientitaj stratoj sufiĉe larĝaj, plus placo kaj publikaj domoj, estigis novan urbokvartalon, la Malaltan, kiun favoris kontraŭ la Alta privilegiaj decidoj de la magistrato. Ĉi tiu Malalta

Kvartalo eĉ pretendis fornuligi la Altan — kio jam estis neebla; tamen la Malalta sukcesis starigi al si novan parohon, tiun de *los Remedios*, kiu, post longa procezo, atingis dividon de la rentumoj kun la pli frua paroho, tiu de *la Concepción*. La Malalta Kvartalo krome havis magistratan palacon, karceron, grendomon, viandovendejon ktp. Ĉi tiuj konstruaĵoj, kun la loĝejoj de la ĉefaj konkerintoj, ĉirkaŭis parte placon, unue nomitan *de San Miguel* kaj iom poste kaj ĝis nun *del Adelantado*.[1] Malfeliĉe tiu ĉi placo estis tiel erare situigita, ke nur en niaj tagoj, post pli ol kvar jarcentoj kaj duono, ĝi sukcesis esti ĉirkaŭita de konstruaĵoj, kvankam ĝi neniam povos esti urbocentro.

La starigo de la ĉirkaŭurba paŝtejo, eĉ se ĝi donis ĉiam verdan zonon al la domhava areo, baldaŭ evidentiĝis malhelpo leĝe nevenkebla por cedo de novaj konstrulokoj kaj establado de novaj loĝantoj. Tamen la magistrata malpermeso starigi aliajn urbojn sur la insulo fakte ne haltigis ilian formiĝon. *La Orotava* naskiĝis komence de la 16ª jc., kiam Ortiz de Zárate, reĝa sendito por aprobi aŭ modifi la decidojn de la Adelantado, devigis la terposedantojn cedi konstrulokojn al novaj loĝantoj, kion ĝis tiam ili obstinis ne fari. Spontane okazis same en *Güímar*, *Daute* ktp. Aliaj vilaĝoj formiĝis dank' al disdono de terpecoj en lokoj, kie mankis akvo por irigacio, kiujn terpecojn la Adelantado cedis, ekde la komenco, al novaj loĝantoj, paralele al la privilegiitaj teroj kun akvo, kiujn li distribuis al la ĉefhelpantoj de la konkero. Tiu saĝa politiko liberigis la insulon disde la sistemo de unukultivismo. Tiel, dum la teroj kun akvo estis destinitaj al kultivado de sukerkano kaj sekva sukerindustrio kun sklavogrupoj, la teroj sen akvo donitaj al liberaj plugistoj produktis grenon, vinon kaj aliajn artiklojn por enlanda konsumado, kio originis liberan kamparanan klason, ja malriĉan, sed fieregan je sia libero, ĝis tia grado, ke ordinare kampuloj rifuzis akcepti tagsalajron aŭ dungomonon kaj preferis interdonaci al si reciproke laborhubojn, kiam la kultivoj tion postulis.

Tuj en La Laguna ekloĝis kreskanta klaso de metiistoj, plejparte portugaloj, kiuj donis al la insulo rimedojn satigi la primarajn bezonojn de la loĝantaro, sen tio, ke oni devis sin helpi per importado, dum la unuaj tempoj ĉiam tre kosta kaj tre limigita pro manko de kuranta mono. Kuria kasto baldaŭ aperis, sed ŝajne ĝi ne estis nombra, kiel

[1] *adelantado* 'ĉefkomandanto'. La Katolikaj Gereĝoj dekoris honorofice la konkerinton de Tenerifo, nobelon Alonso Fernández de Lugo, per la titolo Adelantado de Kanarioj.




**Malnova fama sanktejo de La Laguna**

en Las Palmas, kio evitis la bezonon importadi. Koncerne publikan sanon, Tenerifo sukcesis forigi pestojn, kiuj plagis aliajn insulojn.

Ekde la 17ª jc. iom post iom sin sendependigis de La Laguna ĉi ties vilaĝoj, kaj la granda milita sukceso, kiun akiris Santa Cruz kontraŭ la angla admiralo Nelson, kiam ĉi tiu volis konkeri Tenerifon, en la fino de la 18ª jc., apud la loĝado en tiu haveno de la ĉefkomandantoj de la Insularo, pro la profito, kiun donis al ili la mara trafiko, determinis la politikan leviĝon de Santa Cruz, unue kiel sendependa komunumo kaj poste kiel ĉefurbo, komence nur de Tenerifo, sed baldaŭ de la tuta Arĥipelago.

Post tiam nur institutoj kun pli da morala ol da ekonomia gravo sidas en La Laguna: religiaj centroj kun la dua episkopejo de Kanarioj, ŝtata liceo dum preskaŭ unu jarcento unika en la Insularo, geinstruistaj seminarioj, teĥnikaj lernejoj kaj, fine, universitato.—E. SERRA.

Agradecemos a la Caja General de Ahorros de Tenerife y a Litografía A. Romero, S. A. su colaboración al XXIX Congreso Español de Esperanto

# RELACIÓN DE CONGRESISTAS

## DE HONOR

| | |
|---|---|
| Jesús Maynar Duplá | La Laguna |
| Elías Serra Ràfols | La Laguna |

## NUMERARIOS

| | | |
|---|---|---|
| 1 | Miguel Sancho Izquierdo | Zaragoza |
| 2 | Pilar Rebullida de Sancho | Zaragoza |
| 3 | Salomé Sancho Rebullida | Zaragoza |
| 4 | María Pilar Sancho Rebullida | Zaragoza |
| 5 | Víctor Ortiz Gratal | Zaragoza |
| 6 | Pilar Bardina de Ortiz | Zaragoza |
| 7 | Emilia Gastón Burillo | Zaragoza |
| 8 | Inés Gastón Burillo | Zaragoza |
| 9 | Emilio Gastón Burillo | Zaragoza |
| 10 | María Victoria Nicolás de Gastón | Zaragoza |
| 11 | Rafael Gastón Nicolás | Zaragoza |
| 12 | Elena Gastón Nicolás | Zaragoza |
| 13 | María Pilar Gómez Hernández | Zaragoza |
| 14 | Francisco Máñez Sánchez | Zaragoza |
| 15 | Victoriana Bueno de Máñez | Zaragoza |
| 16 | José Andrés Aldana | Zaragoza |
| 17 | M.ª Concepción Andrés Izaguerri | Zaragoza |
| 18 | M.ª Pilar Andrés Izaguerri | Zaragoza |
| 19 | Eusebio Maynar Duplá | Zaragoza |
| 20 | María Fernández Salaverri | Zaragoza |
| 21 | Juan Régulo Pérez | La Laguna |
| 22 | Antonio Ferrer Hervás | La Laguna |
| 23 | Ángel Pombrol Hernández | La Laguna |
| 24 | Ramón Rodríguez Peña | La Laguna |
| 25 | Nicolás Pérez Álvarez | La Laguna |
| 26 | José Palmero Pérez | Puerto de la Cruz (Tfe.) |
| 27 | Antonio Ferrer Soler | La Laguna |
| 28 | Antonio Benítez Hernández | Santa Cruz de Tenerife |
| 29 | Francisca González Ramos | La Laguna |
| 30 | Ana María Ferrer Hervás | La Laguna |
| 31 | Vicente Hernández Llusera | Sabadell |
| 32 | Ángel Mañero González | Valencia |
| 33 | M.ª Teresa Martí Monfort | Valencia |
| 34 | Frantisek Jindra | Ceská Trebová (Chescos.) |
| 35 | Luis de Otaola y Faón | Bilbao |
| 36 | M.ª de la Encarnación Lizaso de Otaola | Bilbao |
| 37 | Cecilio Olalla Miguel | Bilbao |
| 38 | Ángel Enríquez de Salamanca y Lorente | Rus (Jaén) |
| 39 | Paloma Enríquez de Salamanca y Muller | Madrid |
| 40 | Fermín de Urmeneta y de Cervera | Barcelona |
| 41 | Manuel Manteca López | Icod de Los Vinos (Tfe.) |
| 42 | Ángeles Sánchez de Manteca | Icod de Los Vinos (Tfe.) |
| 43 | Mari-Carmen Manteca Sánchez | Icod de Los Vinos (Tfe.) |
| 44 | José Joaquín Ferrer Hervás | La Laguna |
| 45 | Dácil Pombrol Díaz | La Laguna |
| 46 | Carmen Rodríguez Hernández | La Laguna |
| 47 | María Régulo Rodríguez | La Laguna |
| 48 | Ana Régulo Rodríguez | La Laguna |
| 49 | Isabel Régulo Rodríguez | La Laguna |
| 50 | Clara Régulo Rodríguez | La Laguna |
| 51 | Joan Sala Campamà | Sabadell |

| | | |
|---|---|---|
| 52 | Lazaro Ludoviko Hernández Royo | Sabadell |
| 53 | Joaquín Hutesà Costajuessà | Sabadell |
| 54 | Esperanto-Grupo "Stelo de Paco" | Barcelona |
| 55 | Antonio Bohigas Ferrán | Barcelona |
| 56 | Gabrielino Granel Julián | Barcelona |
| 57 | Dolores Brugués Bertrán | Barcelona |
| 58 | Santiago Terradas Ors | Barcelona |
| 59 | Josefa Ferrer de Terradas | Barcelona |
| 60 | Francisca Rusiñol Serra | Barcelona |
| 61 | Agustina Roca Mas | Barcelona |
| 62 | Grupo Esperantista "Fido kaj Espero" | Valladolid |
| 63 | Mariano Izaola Martínez | Bilbao |
| 64 | Francisco García López | Basauri (Vizcaya) |
| 65 | Araceli Ortega de García | Basauri (Vizcaya) |
| 66 | Antonia Lapuerta Palacios | Zaragoza |
| 67 | Avelina Barrabés Bielsa | Zaragoza |
| 68 | María Cruz Tejero Esteban | Zaragoza |
| 69 | María Jesús Matilla | Zaragoza |
| 70 | Jozefo Ferdinando Soler Sempere | Valencia |
| 71 | Manuel Ortigosa Bernal | Zaragoza |
| 72 | Rafael Palacios Herranz | Bilbao |
| 73 | Luisa Sanmartín González | Bilbao |
| 74 | Rodolfo Canet Marín | Alicante |
| 75 | Consuelo Hervás Navarro | La Laguna |
| 76 | Amparo Ferrer Hervás | La Laguna |
| 77 | Calixto Ferrer Hervás | La Laguna |
| 78 | Juan Devís Calpe | Valencia |
| 79 | Olle Olsson | Lund (Suecia) |
| 80 | Miguel Manteca López | Alicante |
| 81 | Rufina Cano de Manteca | Alicante |
| 82 | Pilar Manteca Cano | Alicante |
| 83 | María del Mar Manteca Cano | Alicante |
| 84 | Santos P. Arranz | Madrid |
| 85 | Jozefo Borda Serra | Sabadell |
| 86 | Manuela González Caro | Sabadell |
| 87 | Escolástico Vilella Roig | Barcelona |
| 88 | Antonio Criach Valls | Sabadell |
| 89 | Centro de Esperanto Sabadell | Sabadell |
| 90 | Angelines Moreno García | Zaragoza |
| 91 | María Moreno García | Zaragoza |
| 92 | H. Bronec | Viena (Austria) |
| 93 | José-Julián Fajardo Expósito | La Laguna |
| 94 | Juan Antonio Díaz León | La Cuesta (Tfe.) |
| 95 | Juan Fariña García | Santa Cruz de Tenerife |
| 96 | Víctor Carlos Afonso Díaz | La Cuesta (Tfe.) |
| 97 | Vicente Pérez Torres | La Cuesta (Tfe.) |
| 98 | Manuel Luis Dorta | La Cuesta (Tfe.) |
| 99 | María Pi Cuchi de Maynar | La Laguna |
| 100 | Sociedad Esperantista de Tenerife | La Laguna |
| 101 | Rafael Herrero Arroyo | Valencia |
| 102 | Pilar García Villagrasa | Valencia |
| 103 | Carmen Herrero García | Valencia |
| 104 | Manuel Elezcano Maiztegui | Bilbao |
| 105 | Eduardo Larrouy López | Bilbao |
| 106 | Carmen Norabuena de Larrouy | Bilbao |
| 107 | María Begoña Larrouy Norabuena | Bilbao |
| 108 | Iciar Arteche Urrutia | Bilbao |
| 109 | M.ª Mercedes Machado Machado | La Laguna |
| 110 | Enrique Expósito Amador | La Laguna |
| 111 | Ramón Molera Pedrals | Moyá (Barcelona) |
| 112 | Jaume Molera Urgellés | Moyá (Barcelona) |

| | | |
|---|---|---|
| 113 | Sara Maynar Escanilla | Zaragoza |
| 114 | José Andrés Clariana Laborda | Zaragoza |
| 115 | M.ª Jesús Lacruz de Clariana | Zaragoza |
| 116 | José Clariana Lacruz | Zaragoza |
| 117 | M.ª Jesús Clariana Lacruz | Zaragoza |
| 118 | Salvador Aragay Galbany | Barcelona |
| 119 | Dorothy-May Hawley | Calgary (Canadá) |
| 120 | José González Fontes | La Laguna |
| 121 | Antonio García García | La Laguna |
| 122 | Concepción del Castillo García | La Laguna |
| 123 | Coralia García del Castillo | La Laguna |
| 124 | Jorge-Luis García del Castillo | La Laguna |
| 125 | Jaime Aragay Pujols | Barcelona |
| 126 | Giordano Moya Escayola | Tarrasa |
| 127 | Francisco Castañón Marcos | Valladolid |
| 128 | Ángel Díez García | Valladolid |
| 129 | Salvador Arnella Más | Parets del Vallés (Barna.) |
| 130 | Manuel Díaz Camacho | Los Llanos de Aridane |
| 131 | Manuela Marrero Rodríguez | La Laguna |
| 132 | Otilia López Palenzuela | Santa Cruz de Tenerife |
| 133 | Carmen María Martín de Sosa | La Laguna |
| 134 | María Isabel Martín y Martín | Santa Cruz de Tenerife |
| 135 | Adela Gomila Sintes | Barcelona |
| 136 | José Guitart Escudero | Barcelona |
| 137 | Helios Díaz Hinojosa | Santa Cruz de Tenerife |
| 138 | Carmen Sánchez de Díaz | Santa Cruz de Tenerife |
| 139 | Helios Díaz Sánchez | Santa Cruz de Tenerife |
| 140 | Elena Díaz Sánchez | Santa Cruz de Tenerife |
| 141 | Rosalydia Díaz Sánchez | Santa Cruz de Tenerife |
| 142 | Miriam Esther Díaz Sánchez | Santa Cruz de Tenerife |
| 143 | Alfred Kirch | Epernay (Francia) |
| 144 | Nicette Vilemain | Epernay (Francia) |
| 145 | Maurice Mongeois | Epernay (Francia) |
| 146 | Carmen Acosta Sosa | Puerto de la Cruz (Tfe.) |
| 147 | Mercedes Palmero Acosta | Puerto de la Cruz (Tfe.) |
| 148 | Juan José Palmero Acosta | Puerto de la Cruz (Tfe.) |
| 149 | Raimundo Ibáñez Crespo | Madrid |
| 150 | Liceo Madrileño de Esperanto | Madrid |
| 151 | Salvador Oliván Hernando | Vigo |
| 152 | Fernando Dacosta Carreras | Vigo |
| 153 | José García Sampedro | Vigo |
| 154 | Emilio Crespo Cano | Vigo |
| 155 | Jesús Loureiro Lago | Vigo |
| 156 | Marcos Estévez Yanes | Icod de los Vinos (Tfe.) |
| 157 | Carmen-Felisa Sigú y Sigú | Santa Cruz de Tenerife |
| 158 | Francisco Alsina Plana | Barcelona |
| 159 | M.ª Concepción González Santana | La Laguna |
| 160 | Luisa-Raquel Martín González | La Laguna |
| 161 | Manuel Sosvilla Massieu | Santa Cruz de La Palma |
| 162 | Ángel Pérez Pérez | Los Naranjeros (Tfe.) |
| 163 | Rosa-María Fernández Rodríguez | La Laguna |
| 164 | Asunción Ferrer Hervás | La Laguna |
| 165 | Emilio Verdú Ferrandis | Valencia |
| 166 | Consuelo-Elisa Ferrer Hervás | La Laguna |
| 167 | Juan Antonio Cruz Auñón | La Laguna |
| 168 | Senén Martín Hernández | Santa Cruz de Tenerife |
| 169 | Juan Padrón Morales | La Laguna |
| 170 | Mario Perera del Castillo | Bajamar (Tfe.) |
| 171 | Víctor Aguado Zaragoza | La Laguna |
| 172 | Henri Vatré | Le Lignon (Suiza |
| 173 | Madeleine Vatré | Le Lignon (Suiza |
| 174 | Ernesto Sonnenfeld | Montevideo (Uruguay) |

| | | |
|---|---|---|
| 175 | Eduviges Reissmann de Sonnenfeld | Montevideo (Uruguay) |
| 176 | Roger Bernard | Bois-Colombes (Francia) |
| 177 | Madeleine Bernard | Bois-Colombes (Francia) |
| 178 | Gaston Waringhien | Vitry-sur-Seine (Francia) |
| 179 | Andrée Waringhien | Vitry-sur-Seine (Francia) |
| 180 | Kálmán Kalocsay | Budapest (Hungría) |
| 181 | M.ª Isabel García García | La Laguna |
| 182 | M.ª del Carmen Bas García | La Laguna |
| 183 | Ramón Gómez Brito | Santa Cruz de La Palma |
| 184 | Manuel Delamo Lorente | La Laguna |
| 185 | Jaime Benito Cedo | Zaragoza |
| 186 | María Po de Benito | Zaragoza |
| 187 | Tomás Bravo de Laguna y López | La Laguna |
| 188 | Juan Pérez Izquierdo | La Laguna |
| 189 | Miguel Peraza Hernández | La Laguna |
| 190 | Cristóbal González Herrera | Guamasa (Tfe.) |
| 191 | Rosa Rodríguez Pérez | La Laguna |
| 192 | Pedro Reyes Rodríguez | Santa Cruz de Tenerife |
| 193 | Rezervita | |
| 194 | Grupo-Eperanto Foment Martinenc | Barcelona |
| 195 | Francesc Vilà Costa | Barcelona |
| 196 | Teresita Estanislao | Barcelona |
| 197 | Veneranda Domínguez de la Cruz | Santa Cruz de Tenerife |
| 198 | Félix Gómez Martín | Madrid |
| 199 | Jan Sigda | Starachowice (Polonia) |
| 200 | Janez Zadravec | Maribor (Yugoslavia) |
| 201 | Salvador Gumá Clavell | Reus |
| 202 | Rosa Roselló Fradera | Reus |
| 203 | Jorge Gumá Roselló | Reus |
| 204 | Visitación Viñes Ibarrola | La Laguna |
| 205 | Joe Lencer | Daytona Beach (EEUU) |
| 206 | Daphne Lencer | Daytona Beach (EEUU) |
| 207 | Rosa Rivero Linares | La Laguna |
| 208 | Fernando de Diego de la Rosa | Zaragoza |
| 209 | Dolores Cabrera Medina | La Laguna |
| 210 | Eduardo Charif Chams El Din | La Laguna |
| 211 | Carlos González García | Icod de los Vinos (Tfe.) |
| 212 | José-Manuel García Cabrera | La Laguna |
| 213 | Real Sociedad Económica de Amigos del País de Tenerife | La Laguna |
| 214 | Gian Carlos Fighiera | Bruxelles (Bélgica) |
| 215 | Ada Fighiera-Sikorska | Bruxelles (Bélgica) |
| 216 | Reinhard Haupenthal | Sulzbach (Alemania) |
| 217 | Irmtraud Lukesch | Freiburg (Alemania) |
| 218 | Cecil D. A. Capp | London (Inglaterra) |
| 219 | Instituto de Estudios Canarios | La Laguna |
| 220 | M.ª Pilar Vizcarra | Zaragoza |
| 221 | M.ª Presentación Vizcarra | Zaragoza |
| 222 | Magdalena Pons | Zaragoza |
| 223 | Amalia Núñez Dubús | Pamplona |
| 224 | Francine Ballaven | Paris (Francia) |
| 225 | Helios Ortega Quevedo | Las Palmas |
| 226 | Antonio Álvarez Méndez | Garachico (Tfe.) |
| 227 | Candelaria Santana de Estévez | Icod de los Vinos (Tfe.) |
| 228 | Esteban Hernández García | Garachico (Tfe.) |
| 229 | Nieves Rosa Díaz Hernández | Santa Cruz de Tenerife |
| 230 | Victor Sadler | Rotterdam (Holanda) |
| 231 | Akie Kato | Yokohama (Japón) |
| 232 | Ulrich Lins | Köln-Dellbrück (Alemania) |
| 233 | José Báez Báez | Las Palmas |
| 234 | Abel Puerta Cabrera | La Laguna |

# RELACIÓN COMPLEMENTARIA DE CONGRESISTAS

| | | |
|---|---|---|
| 235 | Florencio Enfedaque Tremps | Madrid |
| 236 | Rafael Gisbert García | Barcelona |
| 237 | Marina Ferrandis de Gisbert | Barcelona |
| 238 | Miguel Ángel Machado González | La Cuesta (Tenerife) |
| 239 | Juan Martín Hernández | La Laguna |
| 240 | Juan Federico Martín de Armas | La Laguna |
| 241 | Carlos Boloix | Zaragoza |
| 242 | David Buhlmann | Lausanne (Suiza) |
| 243 | Esteban Alejandro González González | Los Realejos (Tenerife) |
| 244 | M.ª Angustias Matos Rodríguez | Las Palmas |
| 245 | Liberto Puig Gandía | Sabadell (Barcelona) |
| 246 | Visitación Martín Gómez | Madrid |
| 247 | Elsa Báez Velázquez | Las Palmas |
| 248 | Felipe Suárez Falcón | Las Palmas |
| 249 | Juan Bosch Fornals | Valencia |
| 250 | Willam Auld | Dollar (Escocia) |
| 251 | Meta Auld | Dollar (Escocia) |
| 252 | Ángel Padrón Benítez | La Laguna |
| 253 | Emilio Pérez Jimeno | Zaragoza |
| 254 | Francisco Contri Ivars | Denia (Alicante) |
| 255 | Asociación Esperantista Ferroviaria Española | Barcelona |
| 256 | Peggy True | Santa Cruz de Tenerife |
| 257 | Eugenio Pérez Galván | La Laguna |
| 258 | Andrés Rodríguez Barella | La Laguna |
| 259 | Ángel Figuerola Auque | Madrid |
| 260 | Marcelina Palomo de Figuerola | Madrid |
| 261 | Hispana Esperanto Aŭroro | Madrid |
| 262 | José Roberto Vivas Vivas | Maiquetía (Venezuela) |
| 263 | Eliseo Izquierdo Pérez | La Laguna |
| 264 | Elsa Wolf | Santa Cruz de Tenerife |
| 265 | Juan Hernández Ramos | La Laguna |
| 266 | María Pérez Rodríguez | La Laguna |
| 267 | Laura de Armas Falero | La Laguna |
| 268 | Ana Rosa de Armas Hernández | La Laguna |
| 269 | Clementina Tranque Iglesias | Valladolid |
| 270 | Nicolás Palmero Díaz | La Laguna |
| 271 | Alberto Omar y Walls | Santa Cruz de Tenerife |
| 272 | Ladislao Gonda | Budapest |
| 273 | Daniel Santana Álvarez | La Laguna |
| 274 | Jesús García Vigil | Las Palmas |
| 275 | Marta Brosa Quintana | Las Palmas |

1095

Litografía A. Romero, S. A.-Tenerife
Depósito Legal TF. Núm. 868-1969